# TEJO-aktuale: numero 55, 2002-04

## TEJO-SEMINARIO SUKCESIS

De la 10a ghis la 17a de marto en Druskininkai (Litovio) okazis TEJO-seminario dedichita al la temo "Aktiva Civitaneco" kaj celinta doni al junaj aktivuloj spertojn utilajn por agado en iliaj organizoj (inkluzive esperantistajn) kaj Landaj Sekcioj. Malgrau la malmuta nombro da partoprenantoj (entute 13 el 4 landoj), la seminario tute sukcesis dank' al la superba laboro de la organizintoj (kvinhoma teamo el europaj kaj amerikaj landoj plus du surlokaj organizantoj): la partoprenintoj pritraktis historion kaj signifon de civitaneco; trejnighis en teama komunikado, subvencipetado, projekt-managhado; partoprenis interesajn diskutojn. Baldau aperos ttt-ejo kun detala informo pri la seminario.

## LABORBRIGADO EN SVEDIO

La sveda esperantistaro invitas gejunulojn partopreni someran laborbrigadan en Lesjofors (okcidenta Svedio) de la 24a de junio ghis la 13a de julio. La laboro temas pri renovigo en la junulargastejo, gharden-laboroj ktp. Dum la unua semajno okazos diversnivelaj internaciaj kursoj de Esperanto.

Pliajn informojn petu de Torun Jansson, TEJO-komisiito pri laborbrigadoj: torun@barnen.nu.

Jhenja ZVEREVA, redakisto de Kontakto

## TUTMONDA FABELKONKURSO INVITAS INFANOJN VERKI

Paatalo-Instituto estas verkista edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Unu el la agadoj de la Instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj, kiu okazas chiujare jam ekde 1994. Chi-jare la konkurso havas ankau Esperanto-branchon, kiu denove okazas sub auspicioj de UEA. Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas au ankorau studas Esperanton. La chefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesighu pri la uzado de la lernita lingvo, daurigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso Aini Vaaraniemi: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi kaj http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti

## GEJUNULOJ SERCHATAS

Oni serchas gejunulojn 16- ghis 26-jaraghajn por partopreni junularan renkontighon oktobre en Dresden (Saksio, Germanio).

Pliajn informojn petu de Wolfram Roloff, prezidanto de Esperanto-Junularo Saksia (EJUS): Wolfram.Rohloff@epost.de.